

Михаил Лермонтов,
La morto de la poeto
tradukita de Konstantin Gusev

...

Pereis li, poet' de justo,
 Murdita per la kalumni',
 Kun peza plumbo en la brusto
 Kaj venĝavido mortis li! ...
 Ne povis la animo luma
 Subiĝi al la malhonor',
 Li sola kontraŭ fals' monduma
 Ribelis ... Kaj li estas for!
 Murdita! ... Do por kio ploroj,
 De l' povraj laŭdoj tarda ĥor'
 Kaj sinpravigoj de l' sinjoroj?
 Pro fato li jam estas for!
 Kaj ĉu ne vi kolere pelis
 La noblan kanton de liber',
 Elblovi incendion celis
 El la ĵaluzo – nur fajrer' ?
 Do ĝoju ... Mutas bardo nia,
 La bonon romp'is la malbon'.
 Ne lumas plu la stel' genia,
 Forvelkis la solena kron'.
 Murdinto lia senkompata
 Ekpremis feron de la ĉan',
 La koro vanta batis glate,
 Neniom tremis tiu man'.
 Kaj ĉu ne miro, ĉu ne strango?
 Pelata per la sort' migrant',
 Nomadis li en nia land'
 En serĉo de feliĉ' kaj rango,
 Ofende mokis pli kaj pli
 De nia tero lingvon, moron
 Kaj malestimis nian gloron,
 Ne sciis en la sanga horo,
 Sur kion levis sian manon li! ...
 En tombo kuŝas jam la bardo,
 Samkiel tiu, kiun li kun ardo
 Prikantis sorĉe en la versroman' –
 Kantisto de bonkoro kaj bonfarto

*Traduko de la Rusa poeto “Смерть поэта” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

Arg-951-1917 (2013-12-15 10:56:39)

Tiu ĉi poem-esperangigo troviĝas en la retejo http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto_poetou.html.